


LA NORD-AMERIKA

Esperanto- Revuo

NIA JUNULARO PAROLAS



Pitsburgo, Pensilvanio

Marto-Aprilo 1963

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

vol. 11, no. 2

51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio

DONALD BROADRIBB, Redaktoro

La Nordamerikan-Esperanto-Revuon (fonditan en 1953) eldonas la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, landasocio de la Universala Esperanto-Asocio kaj partoprenanto en la programo "Popoloj-al-Popoloj."

Kotizoj: abono kostas \$3.00, donacabono kostas \$2.75 (tri por \$5.00). Membreco simpla kostas \$5.00, kaj inkluzivas abonon. Aliaj kategorioj de membreco estas: subtenanta, \$10.00; patrona, \$20.00; viva, \$100.00; kombinita membreco por geedzoj, \$7.00.

Adreso: ĉion por la Ligo, informpetojn, kotizojn, kc., sendu al la Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania. Komunikojn por la Revuo, sendu al la redaktoro ĉe la adreso de la Revuo.

Oficistoj de E.L.N.A.: Prezidanto, David Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington. Vicprezidanto, Charles Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California. Sekretario, Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania. Kasisto, John Futran, 601 West 164th St., New York 32, New York. Membroj de la Estraro: Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas. Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland. Dorothy Holland, 1701 Rockwood Trail, Fayetteville, Arkansas. Frans J. Jagher, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania. James Lieberman, 24 Claflin Rd., Brookline 46, Massachusetts. Paul Nace, 1410 Ray Rd., Hyattsville, Maryland. Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, California. Roan Orloff Stone, 504 N. 5th St., Gallup, New Mexico. Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

Fakoj de la Ligo: Inform-Sekcio, ĉe Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland. Aŭd-vida Sekcio, ĉe H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. Libro-Servo, Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin. Administracio de la Revuo, ĉe Francis Helmuth, P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

Anoncoj: korespondanoncojn la Revuo presas senpage. Tarifo por aliaj anoncoj, kaj por reklamoj: \$10 por plena paĝo, \$6 por $\frac{1}{2}$ paĝo, \$4 por $\frac{1}{4}$ paĝo, \$2.50 por $\frac{1}{8}$ paĝo; aŭ 15 cendoj por unukolona linio. Sur la ekstero de la malantaŭa kovrilo, anonco kostas 50% pli.

Artikolojn kaj Librojn Recenzotajn sendu al la redaktoro, Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio. Kalkulu 4 tagojn por aera poŝtŝendo, 6 semajnojn por mara poŝto. Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la redakcion antaŭ la 1a de la antaŭa monato.

Nia Kovrilo: Pitsburgo, nia kongresurbo 4-7 Julio, 1963.

Donald Broadribb


LINGVO POR LA MONDO: ANGLA AŬ ESPERANTA?

Tre ofte farata aserto tekstas tiel: "Ni bezonas internacian lingvon, sed oni ne bezonas novan. La angla jam estas la plej populara monda lingvo, kaj multmaniere estas la internacia lingvo." Kutime la argumento plu-asertas ke oni la anglan komprenas kaj parolas ĉie, tiel ke turisto povas ien iri uzante nur ĝin, ke ĝi estas la ĉefa lingvo de industrio, kc. Ne dezirante paroli nur pri teorioj, jen kelkaj rimarkindaĵoj kiujn mi trovis dum la pasintaj kelkaj monatoj, kiuj multe pli elokvente ol argumentado servas por enperspektivigi nian vidon pri la angla lingvo:

Second ORT Course

The second international course at the ORT vocational training school in the coastal resort of Natanya was opened on 25 October; 116 students from nineteen African countries are in attendance, divided into English and French classes.

Israel's Minister of Education and Culture, Mr. Abba Eban, addressed the gathering. A Nigerian student of the first course, Agultola Alosenmi, spoke after him in fluent Hebrew, and pointed out that Hebrew not only allowed the students to get out



and converse with Israelis but provided a common language for those with English-speaking background to converse with their French speaking fellow-pupils.

(Israel News, Okt., 1962.)


Komento: la moderna hebrea estas konstruita lingvo, bazita sur la antikva lingvo, sed multe adaptita. Ĝi bone servis la afrikanon en Izraelo. Sed se li irus al Francujo . . . ?

Antaŭnelonge mia familio aĉetis stebilon, bone faritan, kun relative alta prezo. Ĝi venis el Japanujo kun instrukcilibro, el kiu vi vidas specimenan duonpaĝon sur paĝo 28.

Komento: La japana fabrikinto evidente opiniis ke oni devas provizi al la aĉetinto instrukciojn. Sed ĉu vi ilin komprenas?

La magnetofonoj Grundig estas inter la plej bonaj nun fabrikataj. Sed kiam mi aĉetis grundigan aparaton antaŭ unu jaro, la instrukcilibro (v. paĝon 28) estis tre malfacila tasko por persono studinta en la universitato la germanan lingvon dum tri jaroj.

Komento: Malsimile al la japana fabrikinto, Grundig evidente ne opiniis, ke necesas provizi al aĉetinto instrukcion anglan, kiam ĝi eksportis sian aparaton al anglalingva lando.



Zur Säuberung der Tonköpfe kann nach Abziehen des Schaltknebels für die Bandgeschwindigkeit die Abdeckplatte abgenommen werden. Dazu sind die beiden Befestigungsschrauben mit einer Münze o. ä. zu lösen. Vorher jedoch **Taste „Halt“ drücken, Gerät ausschalten und Netzstecker ziehen!**

La angla ja estas studata en multaj landoj de la mondo. Ankaŭ en Finnlando, unu el la Skandinaviaj landoj kie laŭdire ĉiu parolas flue la nacian lingvon kaj la anglan. Mia kolego Dr. Murtonen, el Helsinki, nun estas en ĉi tiu angle parolanta lando jam de tri jaroj; li verkis du librojn angle. Sed mi ne povas konversacii kun li, ĉar nur la skriban lingvon li komprenas.

Komento: Studi ne signifas kapabli.

Nu, jes, almenaŭ unurilate oni povas fidi ke oni la anglan lingvon uzadas, ĉu ne? La tekniko. La angle parolantaj landoj ja estras la mondon pri tekniko, sendube, kaj ĉiu teknika fako uzas ĉefe la anglan. Almenaŭ tion diras la nefakulo. Eble ĝi eĉ veras pri iuj fakoj, mi ne scias. Sed mian propran fakon mi konas. Ĝi estas ekzotika, do eble netipa: la antikva proksimorienta kulturo, la mondo de la Malnova Testamento. "Religio," se vi volas, sed tre specialigita parto. Pli ol 90% de la arti-

HEMMING

With the needle bar at its highest position, put the hemmer on to the needle bar, instead of the usual presser-foot, as shown in the picture. See that the needle hole of the hemmer should exactly pass the needle through. Cut then the cloth a little on its right corner so that it can be easily rolled up. Lift the hemmer by its foot and try to insert the cloth under the hemmer from the left side with the right edge of the cloth being folded up a little. Insert now into the mouth rolling up of the hemmer the cloth by its right corner cut a bit, so that the edge will roll up itself rightly. Pull the cloth out in order that the needle will catch it and put the presser-foot down on the cloth to begin to make some two or three initial stitches slowly. With your thumb and forefinger holding the cloth rightly you begin to sew hemming then being the edge of the cloth smoothly rolled in.

- 1) Take care to hold the cloth to ensure that the cloth is always feeded sufficiently in the mouth of the hemmer.
- 2) If the edge is slipping out, try to move the cloth a bit to the left and if it is rolled up excessively move your hand a little to the right.
- 3) By the same hemmer you can make lining with a lace while being made the hemming at the same time.
- 4) With the same hemmer you can make also the blind stitch.
- 5) With the wider zigzag stitch and a stronger thread tension, all edge sewing is most neatly made. (A patient practice is required to get skilled with the use of the hemmer and also all other sewing attachments).

PITSBURGA KONGRESO

4-7 Julio, 1963

Rezervu tiujn datojn! La Kongresa Komitato por la 1963a Kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko nomis kiel kongresejon la Pick-Roosevelt Hotel, Sixth and Penn Avenue, Pittsburgh. Neformala komenco de la kongreso okazos la 4an de julio, kiam la kongresanoj povos ekkoni siajn malnovajn kaj novajn amikojn. Formale la kongreso ekfunkcios la 5an, per la solena malfermo kaj la komenco de laboroj.

Se vi ne jam faris viajn planojn por via somera ferio, nepre inkludu la Kongreson. Kaj se vi jam faris planojn, do vi jam pretas partopreni.

Pliajn detalojn presos la Revuo, tuj kiam ili estos sciataj.

koloj kaj libroj estas kaj verkitaj kaj verkataj en la germana lingvo. El la restanta 10%, 5% estas angla, kaj 5% franca kaj sveda. Bedaŭrinde, mi ne legas svede, do la fakuloj en Uppsala parolas al si mem.

La sola klera leksikono pri la antikvaj hebrea kaj arama lingvoj eldonita dum ĉi tiu jarcento estas *Lexicon de Veteris Testamenti Libros*, kun germana kaj angla tekstoj. La angla teksto tuj sekvas la originalan germanan, frazon post frazo. La angla teksto parolas pri "oliphants," kaj donas difinojn el kiuj ĉi tiuj estas tipaj: "in formula's of oath"; "the rest of the affairs, what is more to tel"; kaj "bless = gift somebody, something with fortunate power." Mi ne bezonis serĉi tiujn difinojn, ilin mi trovas tuj kiam mi malfermis la libron.

Komento: la leksikono kostis al mi \$25.

Unu lasta penso: ĉu vi konas lernejon, en kiu oni ne jam instruis la anglan lingvon, antaŭ ol komenci instrui la esperantan? Kial oni sentis do la bezonon instrui ankoraŭ alian lingvon (Esperanton) apud la jam monda lingvo angla, se ĝi vere estas monda?

Lasta komento: kiam konato diros al vi ke la angla estas monda lingvo, petu liajn opiniojn pri ĉi tiuj aferoj.

* * *

LERNU VORTOJN

Cu ĵurnalo estas:

- libro, en kiun oni skribas memorindajn spertojn?
- gazeto aperanta ĉiutage?
- malgranda besto el Peruo?
- 24 hora periodo?

Cu agrafo estas:

- angla nobelo?
- neskribita leĝo?
- indekso en la fino de libro?
- malgranda hoko per kiu oni kunligas vestojn?

Cu kofro estas:

- granda ligna kesto, en kiu oni portas vestojn?
- sako en kiu oni konservas monon?
- materialo uzata por fari ŝnurojn?
- nomo de la prezidanto de Ghano?

Cu oni uzas **stebilon** por

- miksi mangajojn?
- rigardi bildojn?
- kudri vestojn?
- fabriki domojn?

Cu **pato** estas

- pozicio en ŝakludo, kiam oni ne povas fari legitiman movon?
- poto, en kiu oni bakas kukojn?
- la piedo de kato?
- mangajo franca, farita el hepato de ansero?

Ĉiu vorto estas oficiala. Respondojn trovu sur paĝo 47.



Nia Mondo Esperanta

Turku, Suomio (= Finnlando): Pierre Naert, nova profesoro de nordlanda filologio en la Universitato de Turku, en sia enoficiga prelego en decembro elektis la temon "Lingvo kaj Kulturo." Lia prelego emfazis la aktualan lingvan situacion, kaj ke nur Esperanto povas solvi la lingvo-problemojn de la mondo.

Glasgow: la eldonejo MacLellan komencas eldoni serion de dulingvaj verkoj, redaktitaj de William Auld, kun tekstoj en la angla kaj esperanta lingvoj. La unua libro estas Ahasvero de la Amo, verkita de K. Kalocsay kaj anglen tradukita de Marjorie Boulton.

Brazilo: en novembro, la brazila Federacia Konsilantaro pri Instruado decidis ke Esperanto rajtas esti liberevole instruata en la lernejoj de la lando.

Bonn, Germanujo: denove grava oficisto en la registaro estas aktiva esperantisto. Ci-foje ni mencias la Ministrin de Justico, Wolfgang Stammberger.

Beograd, Jugoslavujo: 29 julio — 1 aŭgusto okazos internacia konferenco de lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata. Instruistojn oni petas sendi poŝtkartojn, diapozitivajn, infandesegnaĵojn, diskojn, sonbendojn, kc. pri la edukado en ties landoj. Adreso: Jugoslavia Esperanto-Ligo, Terazije 42, Beograd, Pf 201.

Kilimanĝaro, Afriko: la mondfama, nelacigebla esploristo Tibor Sekelj kun la Karavano de Amikeko (travojaĝanta Afrikon) plantis la Esperanto-flagon sur la pinton de la plej alta monto en Afriko kaj unu el la plej famaj en la mondo. Jam konata estas li pro grimpado sur Aconcagua, en Sudameriko, en 1944 kaj 1945. Tibor Sekelj estas aŭtoro de pluraj libroj en Esperanto.



Pistoia, Italujo: nova strato estas nomita "Ludoviko L. Zamenhof, (Dr. Esperanto)."

Firenze, Italujo: la kompleta "Dia Komedio" de Dante aperas en Esperanto. Ĝin tradukis Giovanni Peterlongo, kaj ĝin publicas Edizione SIEI-Milano. La luksa eldono inkluzivas ilustraĵojn faritajn de Sandro Botticelli en la 15a jarcento. Esperantistoj jam de multaj jaroj ĝuas la "Inferon" de Dante en esperanta traduko farita de K. Kalocsay. Nun ili havas la kompletan tradukon.

UNESKO subvenciis la eldonon de libreto "Oriento kaj Okcidento," en Esperanto. La. 50 paĝa libro, verkita de Georges Fradier, kostas 42 cendojn, de UEA.

Liechester, Anglujo: nova leksikono, "The Shoeman's Foreign Terms" inkludas terminojn en la angla, franca, germana, hispana, itala, nederlanda, kaj esperanta lingvoj. Preparis la esperantan parton D. B. Gregor, publicis la verkon Halford Publishing Co.

Riga, Rusujo: la unua gramfonodisko en Esperanto fabrikita en la Sovet-Unio nun aperis. Ĝi estas disko de litovaj kantoj kaj dancoj.

La Usona Registaro denove en 1962 utiligadis Esperanton en sia armea programo. I.a., la Departamento de la Armeo eldonis 200 pagan libron, "Esperanto: The Aggressor Language."

OPORTUNOJ ABUNDAS

Kelkfoje, dum oni kontente plendas al si, ke estas tre malfacile diskonigi Esperanton, ĉar la publiko estas vere apatia, iu alia tutsimple uzas sian imagon kaj atingas mirinde bonan rezulton. Oportuno por tio okazis antaŭ du monatoj. Atentema esperantisto, vidinte la bezonon publike pridiskutigi Esperanton (pro baldaŭ okazontaj kursoj, al kiuj necesis logi personojn) atentigis ĵurnalon pri unu

el la ofte okazantaj internaciaj interesaj esperantaj. Kaj la rezulton vi parte vidas supre: artikolo sur la dua paĝo de la sabata eldono de *The Age*, de la 5a de januaro. Sekve de la artikolo, ankaŭ leteroj al la redaktoro pri Esperanto povis bonvene aperi, kaj tiel plukonigi la lingvon. Oportunoj abundas, nur necesas . . . atentema esperantisto.

News of the Day

NEWs is news in any language. It can become newscier because it is in Esperanto.

A Melbourne Esperantist yesterday received a note from a Yugoslav speaker of the universal language, Tibor Sekelj, explorer, journalist and president of the Internacia Geografica Asocio.

Mr. Sekelj, who is touring Africa under the sponsorship of the Universal Esperanto Association, recently led an international party known as the "caravan of friendship" up Killimanjaro (19,321 ft.), the highest peak in Africa.

On the summit (as the picture shows) he raised several flags, including the Esperanto flag.

Mr. Sekelj has twice (1944 and 1945) taken that flag to the top of Aconcagua (23,080 ft.), in the Andes, the highest mountain in America.

Perhaps he will bring the flag to Australia. Mt. Kosciuszko (7316 ft.) would be very easy for him, or, as they say in Esperanto, 'estus tre facile al li.'



Mr. TIBOR SEKELJ
... Esperanto is for
top (of Killimanjaro)
people.

Belsona

WHEN we rang Mr. W. J. Drummond for that fragment of Esperanto he told us that a new course in the language would be held at Richmond every Monday evening, starting next week.

Details of the course are available from Mr. Drummond at the Esperanto Information Bureau.

One of the course's teachers is Mr. Marcel Leereveld, who teaches French at a Melbourne private school. He came to Australia from Holland a few years ago after he and Mr. Drummond, who is vice-president of the Melbourne Esperanto Club, had corresponded in Esperanto.

Esperanto was devised by a Polish oculist, Dr. L. L. Zamenhof, an idealist who presented the language as a gift to the world in 1887.


Now, says Mr. Drummond, scores of thousands of people speak Esperanto, and it finds a place in many universities throughout the world.

Melbourne Esperanto Club has more than 100 members.

Mr. Drummond assures us that Esperanto is simple, flexible and melodious (simpla, flexebla, belsona) and a passport to international friendships.


KONGRESO MEKSIKA

Sur
La
Piramido
De la
Suno



La Esperanto-Meksika Asocio okazigis la unuan fojon tutlandan kongreson de Esperantistoj, la 15-19 dec. 1962, en la ĉefurbo Meksiko. Partoprenis proksimume 40 personoj, inkluzive 5 alilandajn gastojn. La kongresejo estis la kultura centro "Nova Erao" en la mezo de la urbo.

Apertis la kongreson la nova prezidanto de EMA, Jose Serrano, kiu atentigis ke "la sukceso de Esperanto tra la mondo nur dependas de la Esperantistoj mem." La kongreso, li diris, celas konigi Esperanton tra la tuta lando, kaj signifas la komencon de jaraj kongresoj en diversaj urboj meksikaj.



Ĉe la
Kolono
De la
Libereco

PRI MARJORIE BOULTON



En la esperanta poezio, eble ne estas poetino kies nomo estas tiel fama kiel tiu de la angla Marjorie Boulton, magistro pri la anglaj lingvo kaj literaturo el la Universitato de Oxford kaj homo de multflanka talento kaj eksterordinara intelekto. Sia nomo estas jam delonge famkonata en la angla literaturo. Si estas aŭtoro de pli ol 20 verkoj (inkluzive de poemaroj) kaj estas ankaŭ la plej produktiva poeto en la esperanta poezio. Siaj poemoj, noveloj kaj drametoj estas jam plurfoje premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA. En la Belartaj Konkursoj de 1962 ŝiaj verkoj ricevis premiojn en ĉiuj branĉoj. Tio ja ne estas surprizo, ĉar la bonfamo kaj la kreo-povo de nia angla poeto jam estas vaste konata en la esperantista mondo kaj ekster ĝi. Sia nomo jam signifas plezuron por ĉiu serioza esperantisto kaj amanto de esperanta literaturo. Siaj sukcesoj mondkalaj en la es-

peranta literaturo estas la garantio de bonfamo de nia originala literaturo.

Mirinda estas la fakto, ke Marjorie Boulton eklernis Esperanton en 1949. Tiam ŝi estis 25 jara. Sed nur ses jarojn poste, ŝi surprizis la esperantistan publikon per sia unua poemaro en Esperanto, **Kontralte**, en kiu montriĝis la tenera kaj sobra animo poeto.

En la sekvintaj jaroj ŝiaj poemaroj eldoniĝis unu post alia: **Cent Gojkantoj**, **Eroj**, ktp. Ili pliriĉigis nian originalan literaturon grandskale.

Kvankam ŝi estas amata kaj estimata de multaj gesamideanoj — personaj amikoj kaj ordinaraj legantoj en la tuta mondo — tamen en la privata vivo ŝi estas sola, kun sia kara olda patrino kaj la renoma kato Montevideo, kiu estas ankaŭ mondkonata pro siaj fotoj presitaj en diverslandaj Esperanto-gazetoj.

Tia intelekta kaj talentoriĉa virino certe ne kontentas pri la ĉiutaga bana vivo. Si volas enprofundiĝi en la vivon kaj serĉi ĝian veron. Trofrue maturiĝinta menso kaŭzis al ŝia sentimentala koro nur senĉesan doloron. Kiel ŝi mem konfesis en la eseo **La Poezikreado, Observita Subjektive** verkita por la libro **Sciencaj Studoj** (1958):

Mi havas korpon tiel trosenteman, ke mi dum almenaŭ dudek jaroj neniam travivis tagon sen doloro aŭ fizika ĝeno; sed tiu ĉi trosentema korpo ankaŭ tiel forte sentas plezuron, ke mi preskaŭ neniam travivis tagon sen tremiga volupto.

(P. 110.)

Si estas ege simpatia, naturĉarma, kun larĝa frunto — la signo de plensageco kiel ĉe multaj geniuloj. En la privata vivo ŝi estas modesta, amema, grandanima kaj helpema. Si mem jam multe spertis la amarecon en la vivo, kaj diversaj malsanoj ŝin turmentadis, kaj ŝi bonege scias kiel la homa varmo necesas por la homoj petantaj helpon, ĉar la homa varmo "kvankam senkosta, tre mankas en ĉi mondo frosta". (El "Iom da Homa Varmo" en **Norda Prismo** numero 2, 1959.)

Si estas ĉiam preta helpi la pli junajn kolegojn en nia poezio. Ekzemple, pri la unua poemaro de la islanda poeto Baldur Ragnarsson **Ŝtupoj Sen Nomo** ŝi verkis tre favoran recenzon por la revuo **Esperanto** de UEA. Si verkis antaŭparolon por la unua poemaro de la sudafrika poeto Edwin de Kock **Ombroj de la Kvara Dimensio**. Si verkis dediĉan poemon al la brazila poeto Geraldo Mattos por lia poemareto **Miniaturaj**. Multajn ekzemplojn oni povas citi. Unuvorte, ŝia helpemo estas senlima. Si varmigas la homojn ne nur per sia verkado, sed ankaŭ per sia grandanima agado. Kaj al mi, juna debutanto sur nia poezia kampo, ŝi multe helpadis per utilaj konsiloj kaj per sendado de Esperanto-legaĵoj.

En la somero de 1962 ŝi skribis al mi, i.a., ke unu el la aferoj kiuj ŝajnas al ŝi plej farendaj estas "bonfari

al iu alia laŭ miaj limigitaj ebloj."


Estas tute nature, ke homo tiel grandanima kaj helpema fariĝas ankaŭ la atakobjekto de maliculoj, kies intenco estas makuli la nomon de nobla homo, kaj kalumnii kontraŭ ties reputacio kaj honoro. Tio ankaŭ okazis al ni meritplena poeto. La 2an de junio, 1962, ŝi skribis al mi el Hexham:

. . . . Mi ricevas la impreson, ke multaj homoj jam malŝatas min, ĉar aliaj ŝatas min, mi ricevis premiojn pro mia verkado, ktp. Mi memoras pri mia patro, kiu ĝenerale estis bona kaj tre socie utila homo, ke se oni laŭdis iun antaŭ li, li tuj sentis grandan deziron mallaŭdi tiun personon, trovi en li ian mankon. Nu, mi mem kiel infano tute ne komprenis tiun homan emon, kaj eĉ hodiaŭ mi neniel povas kompreni ĝin; male, estas al mi malagrabla kiam mi aŭdas kritikojn de aliaj, kaj mi volas defendi ilin; sed mi nun scias, ke estas oftega homa eco; ke ĵaluzo kaj envio ludas grandan rolon en la homa vivo. Oni turmentis tiamotive kelkajn el la plej grandaj esperantistoj, precipe Zamenhof mem kaj la noblajn Privat kaj Lapenna. Antaŭ ne-longe iu persekutis kaj grave endanĝerigis min per anonimaj leteroj kiuj akuzis min pri malbona konduto; kaj mi jam legis diversajn aludojn, kiuj sciigis al mi, ke kelkaj homoj ne pardonas al mi mian popularecon.

En letero de 24/jun/1962 ŝi skribis al mi denove pri tio:

Mi ofte miras, kiel en la vivo homoj, kiuj faris nenion valoran, atakas kaj kalumnias noblajn homojn, kiel ekzemple nian karan Lapenna, aŭ homojn, kiuj almenaŭ faras utilan laboron kaj nemalbonfaras al aliaj, kiel min. Sed mi nun vidis, ke tio estas tre ofta okazo. Kredeble tio fontas el ĵaluzo, kiu en si mem estas io tre malnobliga. Mi neniam penis malbonfari al alia persono, kvankam alie mi faris multajn stultajojn kaj eĉ mistarojn.

Sufiĉas la supre cititaj vortoj por montri la noblan karakteron de nia eminenta poeto Marjorie Boulton. Por ŝi mem ĉiam pledas ŝiaj valoregaj esperantaj verkoj kaj ŝia sinofera poresperanta laboro.



Armand Su

Armand Su

DIBOĈULO

Nur la virina beleco lin ravas,
kaj ĉio cetera al li ne gravas.
Per mono aĉetas li ĉion aĉeteblan,
eĉ la virinan korpon nevendeblan.
En li pulsas nur la pasia volupto,
kaj li volas ĝuegi ekster la nupto.
Jen dum la hor' ekstaza kaj malsobra
solviĝas rapide lia problem' propra.

LIBROLEGANTOJ ATENTU.

Ni ricevis informon ke la Esperanta Libro-Servo en El Cajon, California, ne plu ekzistas.

Aliflanke, ni ĝojas informi niajn legantojn, ke granda kaj tutlande konata librotitiko, Shorey Book Store, 815 Third Avenue, Seattle 4, Washington, de nun vendas ĉiujn haveblajn Esperanto-librojn. Oni povas perpoŝte mendi verkojn.

Donald Broadribb

NIA LANDNOMA PROBLEMO

Ankoraŭ la plej multaj lernolibroj ignoras la problemon pri landnomoj, aŭ nur malprofunde ekzamenas ĝin. La leksikonoj ne diskutas ĝin. Konsekvence, la lernanto ofte estas konfuzita, kaj tre embarasita, volante klarigi la aferon por si. Jen, do, malgranda resumo pri la aktuala situacio.

1. Radikoj: Nur tre malmultaj el la nomoj estas oficialaj. En decembro, 1958, la Akademio de Esperanto per sia "Sepa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro" agnoskis la oficialecon de angl, franc, german, hispan, rus, kaj turk. Sekve:

Anglujo, Angllando
Francujo, Franclando
Germanujo, Germanlando
Hispanujo, Hispanlando
Rusujo, Ruslando
Turkujo, Turklando

estas oficialaj landnomoj. Ili estas la solaj landnomoj oficialaj en nia lingvo. (Krome, menciindas, ke **Eŭropo, Berlino, Bulonjo, Londono, Parizo, Novjorko, Vaŝingtono, kaj Varsovio** estas ankaŭ oficialaj, laŭ la sama "Sepa Aldono".) Problemo ekzistas pri **Izraelo**, kiu estas ankaŭ oficiala, sed difinita kiel "vira nomo". Sendube ĝi tamen en sia oficialeco estas uzebla ankaŭ por la lando.

Ĉiu alia landnomo, do, estas ne-oficiala. Posedantoj de Plena Vortaro, de Millidge (kaj ĝia suplemento), kc., bonvolu noti, ke la supraj nomoj estis oficialigataj post la apero de tiuj leksikonoj, de ne troviĝas en ili, aŭ ne estas listitaj en li kiel oficialaj.

2. Kiel oni scias, nia tradicio dividas landnomojn en du kategoriojn: a. radikoj, kiuj mem nomas la landon; b. radikoj, kiuj nomas popolon, kaj de kiuj oni povas nur derivi landnomon. Jen la nomoj, por ĉiuj landoj en kiuj estas esperanta movado:

a. Radikoj, kiuj mem nomas la landon

Acoroj (notu la pluralan formon;

Acoro ne ekzistas, laŭ nia tradicio)

Alĝerio
Angolo
Argentino
Aŭstralio
Bolivio
Brazilo
Ĉeĵlono
Ĉilio
Gabono
Gvatemalo
Indonezio
Irlando
Irlando
Israelo/Izraelo (la oficiala formo)
Kameruno
Kanado
Katario
Kenjo
Kolombio
Koreo
Kostariko
Kubo
Libano
Lih/ktenstejno
Madagaskaro
Malto
Maroko
Meksiko/Meksikio
Monako
Mozambiko
Nederlando
Nepalo
Nov-Zelando
Sovet-Unio
Sudafriko
Unuigita Araba Respubliko
Urugvajo
Usono
Venezuelo

Oni rimarkas, ke por kelkaj nomoj estas du tradiciaj formoj.

b. Radikoj, kiuj nomas membron de la popolon

Aŭstro
Belgo
Brito
Bulgaro
Ĉeh/koslovako
Dano
Finno/Fino
Franco
Germano
Greko
Hindo

Hispano
Hungaro
Italo
Japano
Jugoslavo
Norvego
Polo
Portugalo
Rumano
Svedo
Sviso
Turko

Estas notende, ke por kelkaj radikoj ekzistas dubo. Ekz., **Nepalo** estas uzata de kelkaj por la lando, de aliaj por la popolo. Kaj pluraj personoj preferas la nomon **Suomio** por nomi la landon fin(n)an.

3. Por nomoj en listo b., oni devas uzi derivitan formon, nomante la landon. Tiel, aŭstro estas popolnomo, ne landnomo. Du oficialaj derivmanieroj ekzistas (kvankam plejparte la radikoj estas neoficialaj):

-lando

-ujo

kiuj egalsignifas. Do Aŭstrujo aŭ Aŭstralando; Danujo, Danlando; Japanujo, Japanlando; kc.

Jam tre frue (ekz. en la reformprojekto proponita de Zamenhof en 1894) oni sugestis la uzadon de -io. La celo de tio estas pli internaciigi la aspekton de la nomoj. Certe Germanio, Hispanio, Rumanio, Hungario, Svisio, kc. aspektas pli "naturaj" por kelkaj lingvoj. Aliaj nomoj malpli nature aspektas. Ekzemple, Francio, Britio, Fin(n)io estas apenaŭ internaciaj formoj. Japanio, Norvegio, Portugalio estas tute ne internaciaj formoj. Tamen, al multaj personoj tiu sistemo plaĉas, tiel ke ĝi estas ofte uzata. Sed la uzado de -io iĝis parto de la lingvoreformo, kiun proponadis tiu grupo en la movado, kiu volis kombini kun Esperanto certan politikan sintenon. Sekve, kun tiu strangega formo "k" (=kaj, en Esperanto), -io iĝis signo de la SAT-grupo kaj kelkaj aliaj grupoj. Diversmotive, la Lingva Komitato kaj la Akademio neniam akceptis la formon -io.

En la nuna tempo, ekzistas granda konfuzo. En, ekz., la Jarlibro de UEA, ni vidas kaj -lando, kaj -ujo, kaj -io uzataj (Belgujo, Danlando, Jugoslavio).

4. Kion fari? Unue, endas agnoski, ke neniu sistemo donos "naturajn formojn," ĉar en la naciaj lingvoj estas nur kaoso. **Meksikio** estas absurda formo, kondamnenda laŭ ĉiu vidpunkto; **Japanujo** estas egale absurda — en la okcidentaj lingvoj, el kiuj venis la radiko, la radiko mem signifas la landon; **Brazilo** prezentas problemon, ĉar la ĉefurbo de tiu lando estas nomita **Brazilio!**

Gis la Akademio kuraĝos solvi la aferon, rekomendojn ni povas fari:

a. Oni parkere lernu la du seriojn de nomoj, tiuj por landoj, kaj tiuj por popoloj. Tiu distingo, kvankam sensenca (kial persono en unu parto de la mondo estas **anglo**, sed vojaĝinte kelkmil mejlojn iĝas **aŭstraliano**? Kaj inverse?) estas firme parto de nia tradicio.

b. Se oni volas "plej naturaspektajn" nomojn, por la dua grupo de nomoj oni uzu la formon -lando: **Franclando**, **Germanlando**, **Svedlando**, **kc.** Ili almenaŭ estas naturaspektaj, eĉ se ili ekzistas en neniu alia lingvo.

c. Se oni volas "plej zamenhofajn" nomojn, por la dua grupo oni uzu la formon -ujo: **Francujo**, **Germanujo**, **Svedujo**, **kc.**

ĉ. Se oni volas pli konfuzi la aferon, oni uzu la formon -io: **Francio**, **Germanio**, **Svedio**.

d. Se oni volas tute disrompi la lingvon, oni proponu ankoraŭ kvaran sistemon!

David Richardson

HELPOJ POR LERNANTOJ

jam

Ci tiu vorteto povas prezenti mal-facilaĵojn por multaj esperantistoj, en kies lingvoj ne ĉiam troviĝas rekte egala vorto. En simplaj frazoj ĝi tradukiĝas "already". Sed ĝi havas pli vastan senceon, nome, ĝi povas kontrasti novan staton kun malnova. En kombino kun ne oni tute ne povas traduki per "already," "La infano jam ne ploras" — oni ankaŭ povas diri "la infano ne plu ploras," kaj efektive plejofte jam ne kaj ne plu estas samsignifaj. Sed ne ĉiam. Ne plu povas rilati nur al stato, kiu fakte ekzistis antaŭe sed ne ekzistas nun; sed jam ne povas rilati ankaŭ al faro, kiun oni intencis antaŭe sed fakte ne faris: "Vidinte la policanojn en la banko, la ŝtelistoj jam ne plenumis sian planon." Ne eblus diri "ne plu plenumis," ĉar ili eĉ ne havis oportunon por komenci plenumi. Simile, oni povas diri al la infano, se ĝi ploras: "Jam ne ploru" aŭ "Ne plu ploru." Sed se ĝi ne ploras, sed aspektas kvazaŭ ĝi ploras, oni povas diri "Jam ne ploru," sed ne "Ne ploru plu" pro evidentaj kaŭzoj.

kuraĝigi

Ne uzu ĉi tiun vorton, krom por esprimi "igi kuraĝa." Se oni insiste petas aŭ admonas ke iu faru ion, kiun tiu antaŭe timis fari, oni eble sukcesos "kuraĝigi lin." Sed se li antaŭe ne faris ion ne pro manko de kuraĝo sed pro manko de diligento aŭ interesiĝo, oni ne kuraĝigas sed **instigas** lin.

aboni, kotizi

Abono estas kvazaŭ kontrakto, laŭ kiu oni pagas monon por ricevi ion dum fiksita tempo (gazeton, seĝon en teatro, kc.), kotizo estas pago por individua parto de io, kiun oni komune posedas aŭ aĉetas. Ekzemple, "la anoj de la urbo kotizis por aĉeti librojn por la nova publika biblioteko." Oni abonas gazeton (pagas por ricevadi ĝin). Membroj de asocio kutime pagas jaran aŭ monatan kotizon al la grupo (t.e. ili porpagas sian partoprenon en la grupo).

**ĈU VI JAM RENOVIGIS
VIAN ABONON POR 1963?**

MALLONGAJ NOTOJ

Upton Sinclair, fama verkisto usona, skribis al nia sekretario, ke li senkoste sendos al ĉiuj bibliotekoj de ĉiuj specoj, ekzempleron de la libro de sia mortinta edzino, kiel monumenton pro ŝia morto: **Southern Belle**, libron anglalingvan. Sendu la nomon kaj adreson de biblioteko konata de vi al Sinclair Press, 650 North First Ave., Phoenix 3, Arizona, Usono. (Ankaŭ aliaj esperantaj gazetoj estas invitataj, represi tiun anoncon.)

Foto-Konkurso okazos en la kadro de la Universala Kongreso de Esperanto, ĉijare, en Sofio. Ĉiu membro (de UEA, do ankaŭ la membroj de ELNA) rajtas partopreni, sendante maksimume kvin fotojn (maksimuma formato: 13 x 18 cm.), pri "La Homo." Adreso de la konkurso: Bulgara Esperanto-Kino- kaj Fotoklubo, P.K.4, Sofia, Bulgarlando.

Junular - Kongreso ankaŭ ĉijare okazos en la kadro de la U.K. (27 jul - 3 aŭg). Usona peranto estas Humphrey Tonkin, 7 Linnaean St., Cambridge 38, Massachusetts.

Tape Topics, gazeto de la societo World Tape Pals, en sia decembra numero inkluzivis mencion pri la magnetofonbendo "Practical Phrases in Esperanto" kiun ĝi prunteŝendas. (Adreso: 1710 Jackson St., Dallas 15, Texas.)

Mondfederalistoj atentu! La nova broŝuro de la World Federalists of Canada listas kiel unu el la celoj universalan lingvon, kaj sugestas Esperanton.

La Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj (SBET) eldonis serion de lecionoj por instrui Esperanton al sepjaraj infanoj, en la lernejoj. La lecionoj estas nur parolaj (sen libro, sen skribado). Ilia longo povas vari, sed ili devas okazi ĉiutage. (Semajnajn aŭ duonsemajnajn lecionojn oni malrekomendas, ĉar ĉiutaga ripetado en mallongaj lecionoj plej efikas.)

La Universala Kristana Eklezio eldonis tri varbajn foliojn en Esperanto (tr. de Conrad Fisher). Petu

ilin ĉe la adreso 8648 Oakleigh Road, Baltimore, Maryland.

Sugeston por viaj gazetnumeroj sendis al ni nia membro Van Allen Lyman: ke vi ligu pecon de ŝnuro al la maldekstra supra angulo de via ekzemplero de la Revuo, por ĝin pendigi, tiel konservante ĝin por trafolumadi ĝin dum la monato.

Nova porjunulara gazeto en Esperanto aperos en 1964. Provernumeron oni intencas publiki jam ĉijare. Se vi havas ideojn, sugestojn, volas finance helpi la gazeton, aŭ alie interesiĝas, bonvolu skribi al Ivo Osibov, Sinjskih Zrtava 13/11 Split, Jugoslavujo.

Nova faldfolio estas eldonita de la Germana Federacia Fervojo. Ĝia nomo: "Tra Germanio per la Federacia Fervojo." Petu ĝin (senpage) de Germana Fervojista Asocio, Karlstr. 4-6, Frankfurt/M9, Germanujo.

LA MOVADO EN USONO

Los Angeles: novaj postenuloj por 1963 estas, prez. W. W. Glenny, vicprez. Sandor J. Bako, 2a vicprez. Donald Harlow, protokolisto Edwin J. Baker, 2a protokolisto Germaine Chomette, sekretario Robert Moore, kasisto Minnie Porter. La zamenhofa banketo, la 15a de dec., okazis en la Hungarian Village Restaurant, kaj prelegis Joseph Gamble.

San Francisco: la San Francisco Sunday Chronicle, jan. 6, 1963, sur paĝo 4 sub tre grandlitera titolo "Esperanto Gaining in Britain—1000 Students" presigis informon pri la instruado de Esperanto en la britaj lernejoj. La artikolo estas kopiita el la Times de Londono.

San Mateo: la San Mateo Astronomical Society aŭskultis prelegon de Catherine Schulze la 4an de januaro. 110 personoj tiel aŭdadis bonan informon pri Esperanto, kaj krome ricevis ekzemplerojn de la speciala numero de la Revuo. La bulteno de la societo ankaŭ mem bele varbas por ni, per sia januara numero, pri-skribante la preleganton kaj ŝian poresperantan agadon.


Rüdiger Eichholz

POR MAGNETOFON - HAVANTOJ


Faru mem tutbobenan forviŝilon

Magnetofonoj ĉie en la mondo felice estas produktataj laŭ la samaj normoj, tiel ke oni preskaŭ ĉiam povas reaŭdigi bendon faritan en alia lando per alispeca aparato. Tiu favora cirkonstanco ebligas al tiuj inter ni, kiuj posedas magnetofonon, voĉpondi (= voĉe korespondi), kio laŭ mi estas multe pli interesa ol korespondado, precipe se oni volas detale trakti temojn.

Tamen pro teknikaj progresoj nun ankaŭ sur la voĉponda kampo ekestis malfacilaĵoj: Oni pli kaj pli produktas kvartrakajn magnetofonojn, anstataŭ la ĝis nun kutimajn dutrakajn aparatojn. Ni imagu ke A posedas dutrakajn magnetofonon kaj B kvartrakajn:



A: du-trake registrita sonbendo




B: kvar-trake registrita sonbendo

Kiel oni povas vidi per la supraĵ desegnoj, oni povas reaŭdigi per kvartraka aparato (uzante trakojn 1 kaj 4) du-trake registritan sonbendon. Ankaŭ per du-traka aparato oni povas reaŭdigi sonbendon registritan per kvartraka magnetofono, kondiĉe ke oni registris nur la unuan kaj kvaran trakon. Malfacilaĵoj ekestas nur, se B volas resendi sian respondon sur la de A sendita sonbendo. Se B superregistras la de A antaŭe regis-

tritan sonbendon, la magnetofono de B forviŝas malpli larĝan trakon, ol tiun kiun A registris. Se A volas poste aŭdigi la registron de B, li aŭdos ne nur la registron de B sed ankaŭ siajn proprajn neforviŝitajn partojn de la registro, kiun li sendis al B.

Tamen per tutbobenaj forviŝiloj oni povas solvi tiun problemon. Ili estas fortaj elektromagnetoj tra kiujn oni fluigas alternanantan kurenton. La tutan bobenon oni metas apud la polusojn de la elektromagneto, kie la ŝanĝiganta elektra kampo tute forviŝas ĉion, kio estis registrita. La prezo por tiuspecaj forviŝiloj estas inter dek kaj dudekkvin dolaroj, tamen eĉ neelektrista magnetofonulo povas facile mem konstrui tian forviŝilon, kaj la kosto estas preskaŭ nula.

Petu ripariston de radio- aŭ televidaj aparatoj, ke li donacu al vi forĵetotan malbonan kurento-transformilon. Ĉiuj sekundaraj volvaĵoj povas esti bruligitaj, povas havi mallongajn konektojn aŭ breĉojn — ne gravas, se nur la volvaĵo estas enorda. Forigu la kvar ŝraŭbojn, kiuj kuntenas la transformilon kaj la lamenojn. Ĉiu lameno konsistas el E- kaj I-formaj partoj. Forigu la I-formajn partojn de ĉiuj lamenoj, ili estas alterne dekstre kaj maldekstre de la transformilo.



Post tio vi facile povos eltiri la E-formajn lamenojn. Metu ilin same unu sur la alian kaj firme kunligu ilin per du el la antaŭe elprenitaj kvar ŝraŭboj. Forpenu ĉiun sekundaran volvaĵon, zorgeme malvolvante ilin, sed konservu la primaran volvaĵon, kiu estas la lasta interne. Surmetu la primaran volvaĵon sur la internan kernon de la E-laminaro kaj konektu la du dratojn de la primara volvaĵo al ŝaltilo, per kiu vi povos konekti la jam pretan forviŝilon al la elektra kurento.

Farante tion, oni estigas fortan magnetan kampon inter la polusoj P.P.P. Metu la forviŝotan bobonon en skatolo sur tiujn polusojn kaj malrapide movu la tutan bobonon per rondira movo tra la kampo. Turnu la skatolon kaj ripetu la movon. Post 10-30 sekundoj ĉiu registraĵo sur la sonbendo estas forviŝita.

Estas rekomendinde forviŝi sinsekve nur unu aŭ du sonbendojn, ĉar la viŝilo varmegiĝas. Ne uzu ĝin pli longe ol du minutojn; post tio atendu dek minutojn, por ke ĝi povu denove malvarmiĝi.

J. E. N.

Meze en 1962 establiĝis nova grupo, la **Junularo Esperantista de Nord-Ameriko**. Se vi bone legis la januaran numeron de la Revuo, vi informiĝis ke UEA nomis 1963 la Junulara Jaro, do la ekvigliĝo de ĉi tiu grupo estas tre bontempa (kaj ne hazarda).

Mimeografatan bultenon la JEN publicas, ĝin oni povas abonari per unu dolaro. La sama sumo kotizas por ĝenerala membreco (se oni estas ankoraŭ ne tridek-jara). Kiu estas iom tro aĝa, sed apogon emas doni, povas akiri sian membrecon per pli alta pago, kvin dolaroj. Ni trioble salutas la grupon:

1e, ĉar ĝi estas entuziasma Esperanton-uzanta (kaj ne nur Esperanton-rekomendanta) grupo,

2e, ĉar ĝi helpas al ni forgesi nian honton, ĉiam ni memoras nian malsukceson establi junularan agadon dum la pasintaj sep jardekoj,

3e, ĉar ĝia bulteno montras spriton kaj freŝecon, ĉiam admirindaj en nia rutinplena movado.

Jen la respondeculoj: Richard Kollin, sekretario (al li, ĉe la adreso 30 Ave. B, New York 9, New York, oni skribu por pli da detaloj); Kenneth Miner, redaktoro; Stanley Cohen, kasisto; Humphrey Tonkin, komisiito pri eksterlandaj aferoj; John Kooistra, komisiito pri universitataĵoj, Jonathan Pool, komisiito pri varbado.

En nia lumrapide aktiva mondo nenio restas sen efiko. Jam JEN estas la 15a oficiala nacia sekcio de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

Pri la bulteno dirindas kelkaj vortoj — ĝian celon ni vidas simple, per la vortoj "elvoki el usonaj gejunuloj kreotalenton aŭ almenaŭ sinesprimon. En tiu rolo ĝi ankaŭ servas kiel legindaĵo por JEN-membroj" Speciale salutinda estas la aperigado de ĝeneralkulturaj artikoloj, kies rilato kun Esperanto estas nur la lingvo en kiu ili estas presataj. Kiam fojfoje oni enuas pro la konstanta sinludado de la esperanta mondo, estas trankvilige legi ion, kiu havas propran valoron.

Sed, jen, ĉi tiu artikolo nur laŭdas parton de ni! Do sufiĉe, ni lasos tiun grupon mem paroli.

BIBLIOTEKOJ

bezonas librojn kaj gazetojn pri Esperanto. Ofte oni aŭdas la diron, "Ho, Esperanto, ĉu tio ne estis populara antaŭ la unua mondmilito? Kial ĝi mortis?" Konsiderante ke la tipa biblioteko ofte posedas pri Esperanto nur du aŭ tri librojn el ĉirkaŭ 1910, ĉu ni povas miri ke tian ideon havas la publiko? La Peninsula Esperanto-Klubo, por helpi solvi tiun problemon, donacis lernolibrojn kaj la biografion pri Zamenhof verkitan de Marjorie Boulton al kvin publikaj bibliotekoj en sia regiono.

Ĉu via biblioteko posedas aktualan libron pri Esperanto?

JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO

Sendependa organizo aliĝinta al TEJO

JARO DE LA JUNULARO

Unu aferon oni ne povas nei. La kampanjoj de UEA kutime grand-skale sukcesis. Kion pri la unua laborplano? Kion pri la Zamenhofa Jaro? Nun komenciĝis ankoraŭ nova kampanjo sub aŭspicio de UEA — la Jaro de la Junularo.

Spacon mi ne malŝparos skribante pri la graveco de la junularo por nia Movado. Tiuj kiuj gajnas sperton nun en la komplika organiza reto de TEJO — kaj kiuj tre ofte prilaboras novan grundon, kiel faras JEN ĉi tie en Usono — tiuj estos la venontaj gvidantoj de nia monda movado. Ilia sukceso en tiu rolo grandparte dependos de ilia sperto nun en la propra medio — inter la junularo.

UEA, anoncanta ke 1963 estos la Jaro de la Junularo en la Esperanto-movado, montris grandan fidon je TEJO, precipe ĉar TEJO unue sugestis la planon kaj TEJO mem respondecos pri ĝia plenumo. Por la sukceso de la plano nepras la intima kunlaboro ne nur de la naciaj sekcioj de TEJO, sed ankaŭ — eĉ pli grave — de la naciaj asocioj aliĝintaj al UEA, inter ili kompreneble ELNA.

La tuta plano estas longa kaj komplika: ja multajn flankojn havas nia agado. Sed la ĉefaj punktoj resumiĝas jene:

1. Prepari bazajn artikolojn pri la problemoj de la junulara Esperanto-movado.
2. Eldoni broŝuron pri TEJO, ties landaj sekcioj kaj la junulara Esperanto-movado.
3. Fari preparan laboron cele al la eldonado de aparta organo de TEJO, en formo de internacia junulara gazeto tute en Esperanto, de kiu provnumero aperu dum la somero, kaj kies regula eldonado komenciĝu en januaro 1964.
4. Instigi al landaj asocioj fondi junularajn sekciojn.
5. Prepari dokumentojn de CED pri TEJO kaj la junulara Esperanto-movado.
6. Daŭre kaj per ĉiuj rimedoj konvinki la Esperantistan publikon pri la graveco de la junularo en la Esperanto-movado kaj montri la pretecon de la Esperantista junularo ludi ankoraŭ pli pozitivan kaj aktivan rolon en la ĝenerala Movado.

Turnante sin al ELNA, TEJO kompreneble turniĝas ankaŭ al la individuaj membroj de ELNA. Via plej bona metodo kunlabori en la kampanjo Jaro de la Junularo estas per helpo al JEN, kiu, kiel novnaskita organizo, aparte bezonas helpon. Sed TEJO, ĉar ĝi estas internacia organizo sen radikoj en unusola lando, estas tre ofte neglektata de la Esperantistaro. Sed nun ion konkretan ni povas proponi al la publiko: subtenon de nia eldonado de junulara gazeto.

La Fondajo Junulara Gazeto estas oficiala fondajo de UEA, kiun oni starigis por kolekti monon por aperigo de provnumero de la planata junulara gazeto, kaj por subteno de la komenca periodo de la eldonado. Kontribuojn ni bonvenigos — eĉ bezonas! Akceptas kontribuojn en Usono la Kasisto de TEJO: Humphrey Tonkin, 7 Linnaen Street, Cambridge 38, Mass.

Do, la sukceso de la Jaro de la Junularo estas en viaj manoj. Laŭ, ni, la modela agado de ĉiu unuopa usona Esperantisto estus jena—

— Donaci al la Fondajo Junulara Gazeto

— Helpi al TEJO

— Morale kaj finance subteni JEN

— Intense informadi pri Esperanto inter la junularo.

JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO

Sendependa organizo aliĝinta al TEJO

Nia nomo? JEN. Nia celo? Pli-fortigi kaj pliaktivigi la usonan Esperantistan junularon. Nia historio? Nu, mallonga, sed impona. Ni klarigu. . .

Kiom ofte oni aŭdas en naciaj kongresoj tiun saman eldiron: "Ni devas injekti iom da juna sango en nian nacian movadon" aŭ "Ni devas allogi la junularon al nia afero"! Kompreneble, samon oni diradis ankaŭ en Usono, kaj same malbone aspektis la situacio, krom en kelkaj izolitaj kazoj. Sed antaŭ du jaroj tiuj izolitaj kazoj komencis iom pli ofti: fondiĝis aktiva klubo en la universitato de Harvard, komencis kuniĝi eta nukleo da aktivuloj en Novjorko, ekaperis iunaj usonanoj en la internacia movado.

Nu, vi ne pensu ke JEN, kiel nacia junulara sekcio, simple falis el la ĉielo. Ĝi estis unu el la rezultoj de ĉi tiu intensiĝo de agado. Longe oni planis ĝin kaj zorge oni laboradis por ĝia sukceso. Finfine, oni ja ne povas fondi junularan sekcion sen gejunuloj, kaj tempon bezonas la trovado de gejunuloj.

Sed jen la miraklo! Ni komencis serĉi kaj . . . la gejunuloj iom post iom aperis. Evidentiĝis ke pluraj gejunuloj lastatempe lernis Esperanton, sed kontaktis nek la nacian organizon nek aliajn junajn geesperantistojn. De kelkaj vidpunktoj tiuj estis do perditaj talentoj: homoj lingve spertaj, kiuj ne laboris por la movado ĉar ili ne havis fidon je ĝi, aŭ ĉar ili tute ne konstatis ke movado ekzistas. Tiuj homoj nun komencas kunlabori.

Sed kio entute estas JEN? Ĝi estas sendependa junulara organizo aliĝinta al TEJO, kaj do i.a. la usona sekcio de TEJO. Ĝi fondiĝis en Novjorko antaŭ kelkaj monatoj, kaj komencis eldoni malgrandan multobligitan bultenon, kiu, malgraŭ la modesto de sia formato, montris konsiderindan verkistan kaj organizan talenton kaj tuj metiĝis inter la plej elstaraj naciaj junularaj gazetoj en

septembro ĝi gajnis ankoraŭ unu novan spertulon pro la alveno el Britujo de estrarano de TEJO, kiu nuntempe studas en la universitato. En oktobro oni aranĝis en Cambridge renkontiĝon inter du el la novjorkaj gvidantoj de JEN kaj tri estraranoj de la grupo de Harvard. Rezulte de tiu ĉi kunveno kaj pluraj horoj da diskutado, oni faris la necesajn formalajn por doni al JEN iom pli firman organizan strukturon, kaj oni elektis sesmembran estraron.

La renkontiĝo en Harvard faris el esence regiona entrepreno vere nacian organizon. Komencis enveni kontaktoj de la okcidenta marbordo, de norda Usono, de la sudo, eĉ de fora Portoriko. Egale grave, la nova estraro komencis fari kontaktojn en la internacia movado. Rezulte de ĉi-lastata agado, JEN aliĝis al TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kiu kiel junulara sekcio de UEA prizorgas junularan agadon en internacia kampo, kaj konservas kontaktojn inter siaj naciaj sekcioj.

JEN do trovis sin en pozicio utiligi la spertojn ne nur de siaj propraj enlandaj anoj sed ankaŭ de internacia Movado. Sekvis alia estrara kunsido, ĉi-foje en Novjorko: novaj planoj, nova plifirmigo. Kaj fine de januaro ni atendas ankoraŭ novan kunvenon de la estraro, kiam ni akceptos statuton kaj faros definitivajn planojn por la nuna jaro.

Por membriĝi en JEN: jarmembreco (inkl. abonon al la JEN-bulteno) kostas \$1.00 aŭ egalvaloron. La organo daŭre aperos almenaŭ dumonate, kaj ni esperas povi fari ĝin ĉiumonata. Persono pli ol 30 jara pagas unu dolaron por abono, kaj povas iĝi subtenanta membro per pago de 5 dolaroj. Kotizojn sendu al Stan Cohen, 16 Long Avenue, Allston 34, Mass.

Ĉi tiujn du paĝojn redaktis por la Revuo Humphrey Tonkin. Ĉion por la JEN-redakcio sendu al la oficejo de JEN, ĉe Richard Kollin, 30 Avenue B, New York 9, N.Y.


Donald Broadribb

MONDA KULTURO: NOVA GAZETO

Kelkajn semajnojn tro malfrue por recenzo en la lasta numero de nia Revuo ni ricevis la unuan numeron de la nova gazeto **Monda Kulturo**. Ĉi tiu ambicia projekto estas eldonata de U.E.A., kaj aperos kvarfoje dum la jaro. La unua numero ampleksis 32 paĝojn, iomete malpli grandajn ol de la gazeto Esperanto. Ĝin presas la sama firmo en Nederlando, kaj ĝin redaktas la ĝisnuna redaktoro por U.E.A., William Auld (kiu, cetere, ĉesis esti redaktoro de **Esperanto**). La tre alta kosto, \$4.50, de abono eble fortimigos atentindan nombron da interesitoj.

La historio de literaturaj gazetoj esperantaj estas plena de esperoj kaj fiaskoj. La plej multaj el ni konas la nomon **La Revuo**, kiun eldonadis la firmo Hachette antaŭ la Unua Mondmilito, kaj en kiu Zamenhof aperigis multajn el siaj verkoj. Ĝi mortis, kiam Hachette decidis ne plu eldonadi en Esperanto. Posta grava nomo, **Literatura Mondo**, respondecas pri multo bona (kaj malbona) en nia literaturo, sed mortis pro la Dua Mondmilito. Kelkjara provo reestabli ĝin en Hungarlando post la milito fine malsukcesis. Dum tiu milito, unikan eksperimenton faris nia talenta (nun mortinta) verkisto Stellan Engholm, eldonante sian **Malgrandan Revuon**. Tiu etaĵo aperigis principe originalajn artikolojn, kaj rifuzis aperigi korespond-anoncojn aŭ aliajn reklamojn. Ĝia kvalito estis la plej alta ĝis tiam, kaj ĝia abonantaro preskaŭ la plej malgranda. Mizeran morton ĝi suferis, malsukcesinte akiri eĉ 400 abonantojn.

Pli aktualaj estas la nomoj **Norda Prismo** kaj **Nica Literatura Revuo**, kiuj ambaŭ antaŭ proksimume ok jaroj ĉeksurprizis la publikon. Unu (la **Prismo**) per eleganta vesto, redaktata de ankaŭ eminenta literaturisto, Ferenc Szilagy; la alia (**Nica**) per amatoraspekta presado kaj tipe franca paperaĉo, redaktata de eminenta leksikologo, Gaston Waringhien. La kontribuo de ambaŭ gazetoj al la



INTERNACIA REVUO
PRI LITERATURO
FILMO TEATRO

esperanta literaturo ne povas esti tro alte taksata. Ilia sorto estas malgajiga. **Nica Literatura Revuo** anoncis sian venontan morton jam antaŭ multaj monatoj; kaj, la pasintan aŭtunon, **Norda Prismo** avertis ke se ĝia abonantaro ne kreskos ĝis 1500 personoj por 1963, ankaŭ ĝi eniros la tombon.

Guste kiam la movado ŝajnis ankoraŭ ne sufiĉe matura por subteni seriozan artgazeton, U.E.A. komencis la aperigadon de la nova **Monda Kulturo**. Ĝi ne estas neanticipita. Jam de tiu asocio estis eldonata dufoje **Belarto**, kaj la laborplano de la asocio inkludas noton pri la nova gazeto. Ĝi estas komparenda kun nia jama **Norda Prismo**, kies celon ĝi ankaŭ akceptas (aperigi artikolojn ne nur literaturajn, sed ankaŭ pri la aliaj artoj: dramoj, filmoj, eseoj, bildoj), kaj kun la iama **Malgranda Revuo**, kies celon aperigi nur originalajn verkojn ĝi transprenis.

MONDA
KULTURO

Korespond -



Anoncoj

Bulgarujo:

Kiril Hlebarov, G. Delčev 8, Petrič.
(Junulo, volas interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, filmrevuojn; kolektas Esperanto-poŝtmarkojn.)

Ĉeĥoslovakujo:

Dusan Franc, ul. I. Petiletky 695, Nove Straseci. (Kolektas neuzitajn poŝtmarkojn pri kosmonaŭtiko, skoltaj; sendu mankoliston.)
Eugenia Slosarkova, Bri Capku 19, Jihlava. (Serĉas skribamikaĵojn pli ol 40 jaraĵn; korespondos pri ĉiaj temoj; krome deziras interŝanĝi ilustritajn gazetojn kaj librojn.)
Drahuska Hrudkova, Krupinska asta 1157, Zvolen. (12 jara knabino; deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.)
Zdenek Zemen, Gladkovskeho 514, Pardubice. (12 jara; deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, kaj personajn fotojn.)

Danlando:

Geografia klaso deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, kaj desegnaĵojn. Adreso de la instruisto: S-ino Roma Thorsen, Vihenshus

U.E.A. garantiis subteni la aperon de la nova gazeto dum du jaroj. Post tio, evidente, ĝi devos pravigi sian ekziston per altiro de amasa abonantaro. Ni esperas ke ĝi sukcesos pli ol ĝiaj prapatroj.

Kiel impresas la unua numero? Kiel unua numero, ĝi estas bona, kvankam la kvalito de la enhavo tre varias. Leginda estas la unua novelo, Feliĉa Amo, de Szathmari, nomo famiganta en nia mondo. Lia stilo ankoraŭ estas iom ĝene nelerta, sed tion superombas la lerteco de la enhavo. Plej laŭdinda estas japana artikolo aŭtobiografia, La Kaptito, de Miyamoto Masao. Edwin de Kock inspire pritraktis la poeziarton. Redaktoro William Auld pruvis, per recenzado, ke recenzoj ankaŭ estas artformo, kaj mi ĝuis legi ilin. Aliflanke, niaj tre konataj Marjorie Boulton (per drameto "Nia Sango")

Skole, Strandboulev 147, Copenhagen.

Germanujo:

Kurt Schut, 423 Wesel, Friedrichsstrasse 2. (45 jara.)

Hispanujo:

A. Martin Tatay, Lope de Vega 34 bis, Barcelona 5. (Aĉetas, vendas, kaj interŝanĝas filatelajojn de ĉiuj landoj.)
Jose Pascual, Salom 33, Buen Pastor, Barcelona 16 (deziras interŝanĝi kartojn kaj leterojn pri ĉiaj temoj.)

Indonezio:


Uh. Tadin Hsrar, Djetis No. 542, Gn. Pring, Muntilan, Mogeland, Dja-teng. (Pri gazetoj, bildkarto, fotoj, broŝuroj, kc.)
Chasan Kastholani, Watutjongol, Gn. Pring, Muntilan, Mageland. (Komencanto.)

USSR:

Petras Bieliauskas, Zvaigzdziu 9-1, Kaunas 18, Litovio. (14 jara; deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun geknaboj.)

kaj Victor Sadler (nun redaktoro de la UEA-gazeto **Esperanto**, kaj kontribuinto de du poemoj) dolorige surprizis min per verkoj, kies literatura karaktero al mi ŝajnis tre maldadekvata. Du filmartikoloj menciindas: unu, pri la japana filmproduktado estas interesa sed tre unuflanka; la alia, pri la bulgaraj filmoj, estas plenplena de politika propagando; ambaŭ suferas pro tre malalta lingvonivelo.

Mia takso estas tia: tute honeste parolante, mi devas konfesi ke mi multe malpli ĝuis la numeron ol mi anticipis. Tamen, la numero indikas pozitivan strebon firme establi en la esperanta mondo gazeton kies valoro venas ne nur de entuziasmo sed ankaŭ de kvalito. Mi do ĝin rekomendas, kaj esperegas ke mian rekomendon sekvos abonoj.



Gazetoj ricevitaj: La Skolta Mondo, vol. 3 numero 3/4; Kuriero (Studenta Esperanto-Klubo kaj Kleriga Konversacia Klubo) no. 11; Edukado Internacia, okt.; Dansk Esperanto-Blad okt.; Aŭstralian Esperantist, jul-aŭg.; SAT-Amikaro, okt.; Revuo Orienta, okt.; Kvakera Esperantisto, aŭtuno; Internacia Fervoĵisto, jul-aŭg & sept.; Sundial, okt. (usona nudista gazeto, kun artikolo pri kaj de la familio Heilberg); War Resistance (kun artikolo instiganta ke

DE LA SEKRETARIO

pacifistoj lernu Esperanton); Zpravy Ceskoslovenskeho Esperantskeho Vyboru, sept.

Alvoko! Ĉiu loka grupo devus havi unu personon, kiu sisteme, konstante kaj plene sendadu informojn pri ĉio, kio koncernas la grupon en sia regiono kaj aliloke (laŭ ties scio). Ĉiu simpatianto devus sendi.

Ĝis nun, nur du lokaj grupoj (Ĉikago, Vaŝingtono) konsentis aŭ eĉ respondis mian peton pri kunsendado de la lokaj informiloj en unuigita eldono. Aliaj (Napa, S.F., L.A., JEN, HEC, kc) sendas siajn unuope por informi nin.

RESPONDOJ AL LA ENIGMO

APERINTA EN NIA NOVEMBRA NUMERO

1. Numismatiko
2. inundi
3. tarantulo
4. demono
5. plutokratio
6. akrido
7. pleonasmo
8. legitimi
9. omaro
10. festeno
11. talismano
12. flaĝoleto
13. trulo
14. korano
15. lustro
16. epoleto
17. biskvito
18. obelisko
19. indigeno
20. nadiro
21. pramo
22. lanterno
23. akcidento
24. ksilofono
25. neĝo
26. glimo
27. cedro
28. specimeno
29. livreo
30. eŝafodo
31. rastilo



Blanka urso A. Holzhaus

Proverbo: Murmuregas la urso, sed danci ĝi devas.

Neniu sendis solvon por la enigmo.

NORDA PRISMO



kultura — socia — literatura
ilustrita revuo internacia
komencas sian naŭan jaron en 1963



Ĉefredaktoro: Ferenc Szilagyi
Helpredaktoroj: Baldur Ragnarsson
Vilho Setala, Poul Thorsen, John
Hammond Rosbach



Jarabono kostas nur \$2.50. Adreso: Barnhusgatan 8,
Stockholm, Svedlando

DONACOJ POR LA REVUO

Post la presigo de la lasta listo de donacintoj, la sekvantaj personoj sendis kontribuojn por subteni la Revuon:

Lavina M. Parsons \$25

Catherine Schulze \$200

kaj ni ne forgesu mencii, ke Martha Walker varbis por ELNA ĝ novajn membrojn.



NEW AIRMAIL STICKERS

For a big supply of 250, send \$1 to:

Esperanto League Esperanto Press
808 Stewart St. or Oakville, Ont.
Meadville, Pa. Canada

ESPERANTO GROUPS IN THE UNITED STATES

Listed by State, City, and name of person to be contacted for further information:

California:

Hillsborough: Peninsula Esperanto Club (Mrs. Wm. Schulze, 410 Darrell Road).

Los Angeles: Los Angeles Esperanto Club (1406 N. Sycamore Ave., Hollywood).

Napa: Napa Esperanto Club (Mrs. D. C. Walker, 2846 Monticello Road).

Palo Alto: Esperanto in Palo Alto (P.O. Box 11564, Station A).

Sacramento: Esperanto Society of Sacramento (Mrs. Florence Curtis, 5101 Stockton Blvd., Sacramento 20).

San Diego: Esperanto Society (P.O. Box 6215, San Diego 6).

San Gabriel Valley: Blind Study Group (Mrs. Phillips Neuman, 2736 Cogswell Road, El Monte).

Santa Monica: (Mrs. Blanche Parker, 515 25th St.)

Illinois:

Chicago: Esperanto Society of Chicago (Mrs. J. N. Denison, 17958 Homewood Ave., Homewood).

Massachusetts:

Cambridge: Harvard Esperanto Club (Quincey House, Box 8, Cambridge 38).

Springfield: Greater Springfield Esperanto Club (Warren H. Gould, 114 Deerfield St., Greenfield).

Michigan:

Ann Arbor: (Wm. C. Dickerman, 424 Hilldale).

Montana:

Missoula: Esperanto Study Group (Bob Davis, 1721 Helen).

New York:

New York: The Esperanto Society of Greater New York (50 Overlook Terrace, New York 33).

New York: Esperanto-Klubo de Novjorkurbo (Dr. Julius Balbin, 340 Riverside Drive, Penthouse 2, New York 25).

New York: Esperanto Study Group (Frances Leshner, 4 West 28th St., New York 1).

Oregon:

Canby: (Mrs. Wallace Peterson, Route 2, Box 120).

Hillsboro: (Adrian Hughes, 476 S. Bailey Ave.).

Oregon City: Oregon City Esperanto Group (Mrs. Lawrence Winkleman, 4203 S.E. Rothe Rd., Milwaukie 22, Oregon).

Portland: Portland Area Esperanto Club, ESPO (Mrs. Evelyn Deer, 12946 N.E. Hancock St., Portland 30).

Pennsylvania:

Allentown - Bethlehem: Esperanto Club of the Lehigh Valley (Donald Munro, 1961 Erie Ave., Quakertown).

Meadville: Esperanto Study Group (Marcella Fisher, 808 Stewart St.).

Pittsburgh: Esperanto Club of Pittsburgh (L. A. Spriggs, P.O. Box 8302, Pittsburgh 18).

Triŝtata Esperanto-Komitato (W. Pa., E. Ohio, N.W. Va.). (Frans J. Jagher, 2736 Locust Dr., Bridgeville).

Washington:

Seattle: (Vincent Griffeth, 8556 37th Ave., S.W.).

Spokane: (H. K. Ver Ploeg, 1098 E. 8th Ave.).

Tacoma: (Ruth Culberg, 1912 N. Monroe).

Walla Walla: Montvida Esperanto Society (Al Estling, 1351 Grant St.).

National Groups:

Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

Junularo Esperantista de Nord-ameriko (JEN) (Richard B. Kollin, Apt. 4a, 30 Avenue B, New York 9).

Book Dealers:

ELNA Esperanto Book Service, Middleton, Wisconsin.

Shorey Book Store, 815 Third Ave., Seattle 4, Washington.

Both dealers accept mail orders for books.

Se la ĝustaj adresoj aŭ nomoj ne estas ĝustaj, aŭ se ekzistas aliaj grupoj, bonvolu sciigi:

S-ino Dorothy Holland (Estro de la ELNA Membreca kaj Organiza Komitato)

1701 Rockwood Trail,
Fayetteville, Arkansas.

RESPONDOJ POR "LERNU VORTOJN"

Jurnalo: b.

Agrafo: ĉ.

Kofro: a.

Stebilo: c.

Pato: a.

Vortoj kaj respondoj laŭ Plena Vortaro. Se vi erare respondis al pli ol du demandoj, via vortoscio grave bezonas pligrandiĝi.

La plej ofte aperanta—
La plej rapide informanta—
—Esperanto-gazeto

HEROLDO

DE ESPERANTO

20 numeroj jare.

Jarabono: \$4

Nord-amerika peranto:
Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, California

la Praktiko

LA GAZETO DE LA MONDPOPOLO

Monata internacia ilustrita revuo

Jarabono: \$2.75

Nord-amerika peranto:
Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, California

UNUECO ESTAS FORTO

Aliĝu do al via landa asocio:

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
808 Stewart Street
Meadville, Pa., Usono

Kanada Esperanto-Asocio
34 Martin Road
Toronto 7, Ontario, Kanado

Esperanto-Meksika Asocio
Poŝtkesto 10.576
Mexico 1, D. F.

Kaj al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

DE ALASKO AL MEKSIKIO:

La gazeto por ĉiuj esperantistoj sur la nord-amerika kontinento estas

LA NORD-AMERIKA ESPERANTO-REVUO

Jarabono: \$3 (40 steloj)

Abonu ĉe ELNA
aŭ via landa asocio

ESPERANTO PRESS
Oakville, Ontario, Canada
Return and forwarding
Postage guaranteed